28. Vin oni fidas (Psa 65)



2. Vi, ho Potenca, Vi, espero
de l' bordoj de la mar',
de ĉiuj finoj de la tero;
ho forto de l' montar':
Mar-onda bru' en Vi trankvilos,
kvietos konvulsi'.
En Vi aŭror', subir' jubilos.
Miraklojn faras Vi.

3. Vi niajn sulkojn molaj tenas
per riĉa pluvo-don'.
Via torent' per akvo plenas
kaj nia jar' per bon'.
Per brutoj la herbej' kovriĝas,
grasiĝas nia land',
kaj ĉiu kampo gren-vestiĝas,
ĝoj-plenas ĝia kant'.

VIN ONI FIDAS, ONI BENAS • M (Psalmo 65): 1543, LvK p. 106 • E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2002